

& Renkonto en musono:

< Rekante 31 el 61 batoj por strofo, entute 1037 paŝoj dum 11 minutoj. Verkis Evert Taube. El sveda tradukis Martin Strid (2010) kaj aldonis rekantaĵon (2015). Norda Kantaro #4470. Klarigoj (*): '2 La flago de Svedujo estas blua kun flava kruco. '3 "Ŝi" en marista ĵargono estas la ŝipo. '4 Stiristoj de ŝipo rangas en vicordo. '5 "La varmo", tropikaj landoj en mar'komerca ĵargono. '9 Pasporta foto. '10 Al ferdeko, laboro nek stira nek maŝineja. ; Siamo, malnova nomo de Tajlando. ; Hagenbeck, fama bestoĝardeno en Hamburgo, Germanujo. '11 Cejlon(o), malnova nomo de Srilanko. '14 Kamarin' estas urbo sur insulo Malabar'.>

(#Melodio:

<1,6:61>

(So /do dore mi mifa soso sola so; mimi fafa fafa mimi mido re e ; soso mimi soso mimi mimi fafa lala fa; fafa mimi mido rere reTi do o;

(#Rekantaĵo: so3so sola somi redo fa3fa faso la; lala ti3ti tila soso fami faso la so; so3so sofa mimi redo re3re rere so; sofa mi3mi redo rere fami redo re do o)

)×17)+

(&Strofoj:

'1 Ni /ŝipon renkontis en friska la muson' ; dum vaporveturis ni al Ruĝa Mar' ; plenrigitan trimastulon je la nomo de Tifon' ; de Hinduoj' velanta al Bonesperkab'.

(×: 2× **Brile blankaj veloj sur la blua ocean' ; bele grandaj en musona varma vento flirtas.**)

'2 Ni hisu nian flagon, la ŝipestro ordonint' ; kaj ni hisis la flavbluan* por salut' ; kaj eĉ sammomente blovis de la ŝipa gafa pint' ; la Finnlanda blanka kun la blua kruc'.

'3 Ni igis nin proksimen kaj maŝinon al senmov' ; por haltigi, hejmen porti da mesaĝ' ; kaj ŝi* lofis tiam envenanta kun la venta blov' ; de babord', kaj ni transremis kun kuraĝ'.

'4 Nin venis malantaŭe kaj ŝipmeze ŝnur'eskala ; kaj stiristo kvara* grimpis per aplik' ; sed en pobo staras sveda, revidanta min, ŝipan' ; Fritjof Anderson, la infanaĝamik'.

'5 En musono kaj pasato renkontiĝas oni foje; se velas al la varmo* kiel ni, ; tamen surpriziĝis mi kvankam grandis pli la ĝoj' ; revidanta la amikon tie ĉi.

'6 Oni rabis min Ĉinuje, mi rabiĝis en Ŝanhaj' ; kaj mi sidis ĉe piratoj als ostaĝ' ; sed edziĝis mi al la filino de l' murdist' Fu Ŭaj ; diris Fritjof, jen terura veropaĝ'.

'7 Kun la helpo de l' ĉinino venis mi al Singapuro' ; placon staras mi sen mono kaj pasport' ; kiam vir' en or'galonoj al mi iras, la konsul' ; sveda, kapitano Fredrik Adelborg'

'8 Nu saluton, Fritjof Anderson, diras Adelborg' ; kion, die, faras vi en Singapuro'? ; De Rivero Flava venis, volas mi al Goteborg' ; min prefere dungu ŝip' al hejmvetur'.

'9 Mi ricevis blankajn vestojn kaj pasporton kun portret'* ; reĝtitolan kaj mi pruntis pundojn dek. ; Konsulino min invitis al teum' kaj babilo, – mi ĝis tiam ne pli belan vidis, nek.

'10 Nu, mi prenis vaporŝipon kaj dungiĝis al ferdek'* ; ni sovaĝajn bestojn ŝargis en Siam'* ; tigrojn, elefantojn, leonojn aĉetis Hagenbek'* ; ja Hamburge vi vizitis, ĉu, iam'?

'11 Sed el ĉiuj tiu estis plej terura la vojaĝ' ; sudob Cejlon* ni eniris en ciklon', ; elefanton saltis leono kurinta de la kaĝ' ; ; ŝtormo muĝon miksis kun la tondra son'.

'12 Baldaŭ lukoj rompiĝis kaj elvenis la bestar' ; en la maron falis nia komandaj' ; Mastojn elefanto rompis kaj bovon en la maron ĵetis, knabo, kredu min je vorto plej!

'13 L' agenton de Hagenbek' formanĝis la leon' ; en maŝinon nian grimpis nun goril' ; Maŝiniston ŝi imitis per antaŭen, halt', retro' ; ĝis mi pafis ŝin per ŝipestra pafil'.

'14 Estis Nemezo mem de l' ĝangaloj, kamarad' ; baldaŭ restis nur mi kaj la elefant' ; Sudmuson' al ni revenis post ciklona la pasad' ; Kamarinon Malabare* endrivant'.

'15 Sed adiaŭ, ĉar stiristo via iras de ŝiprand' ;
Jes, sed Fritjof, kien pasis l' elefant'? ; Je
revido venontfoja mi respondos al demand' ;
nun ekvelos ni, denove direktant'!

'16 Kaj al pleno ili brasis, jam la iron
komencant' ; kaj reremis ni al nia ŝipo ĉar ; ŝi
musone iris kaj aŭdeblis jam ilia kant' ; Rul' al
hejm', rul' al hejmo trans la mar'!

'17 Mi kalkulis ĉiujn velojn kaj kalkulis ilin re
; de reĝveloj ĝis postmastaj kaj forĵib' ; Estis
sume dudek du blankaj veloj en l' aer' ; sur la
blua oceana trembril'.